

L'Obskuran Pordegon mil-miloj jam devis trairi,
 El kiuj ne unu revenis la Vojon por diri
 Al ni, kiuj sekvos, — Jes, rajtas vi miri, sed sciu
 Ke ĉiu sengvide ĝin devos por si pioniri.³⁾

Demandoj, kiujn oni ofte faras, estas, ekzemple: El kio kreiĝas la materio, kaj en kia formo ĝi aperas? Nu, ĝi kreiĝas el nenio: oni devas supozi, ke efektive vera kreiĝo okazas, kiel daŭra procezo. Se ni ne volas akcepti tiun opinion, ni devas supozi, ke okazis unu definitiva krea ago antaŭ pluraj mil-milionoj da jaroj. La materio kredeble kreiĝas en la formo de atomoj de la hidrogeno, ĉar la hidrogena atomo estas la plej simpla el ĉiuj atomoj, kaj el kosma vidpunkto la hidrogeno estas multe la plej abunda el ĉiuj elementoj. Oni devas supozi, ke la materio kreiĝas ŝance tute tra la spaco, kun statistika unuformeco, sed kun lokaj varioj, kiuj sufiĉas por ebligi la okazaĵon de la denŝiĝo kaj la amasiĝo.

Ĉe la provo kompreni la naturon de la universo kaj sciigi pri ĝia pasinteco, estanteco kaj estonteco la homa menso renkontas problemon eble neniam solvotan. Estas malfacile koncepti aŭ komencon aŭ finon de la universo: sed estas egale malfacile koncepti eternan ekzistadon. La hipotezo pri daŭra kreiĝado estas alloga, kaj eble ĝi iam ricevos observan subtenon. Dume, kiam ni konsideras la pasintecon kaj la estontecon de nia galaksio, ni povas apliki al ĝi la vortojn, kiujn Omar Kajjam aplikis al si mem:

Alvenis mi akve, foriros mi kiel aero.

En tiun ĉi mondon, de kie, nek kial scianta,
 Simile al akvo, nur vole-nevole fluanta.
 Kaj el ĝi, simile al vento siblanta,
 Ne scias mi kien — nur vole-nevole blovanta.

Ĉu do nepetite ĉi tien pelita — de kie?
 Por esti do kien pelota sen pet' de ĉi tie?³⁾

³⁾ La Esperantigon de la dua citaĵo mi ĉerpis kun permeso el „La rubaĵoj de Omar Kajjam laŭ Edward Fitzgerald”, kiu estas Esperant-lingva traduko farita de S-ro C. M. Bean de la Angla poemo *the Rubaiyat of Omar Khayyam*. Ĉi tio estas nur nome traduko, sed ĝi estas bazita sur mezepoka Persa poemo. Sed en la verko de S-ro Bean mi vane serĉis tradukon de la unua citaĵo; li ne tradukis tiun strofon. Do mi devis mem traduki ĝin. Tamen, donante permeson uzi sian tradukon jam presitan de la dua citaĵo, S-ro Bean kompleze provizis ankaŭ tradukon de la unua, stile kaj ritme simila al lia traduko de la aliaj strofoj; do mi povis per ĝi anstataŭgi mian propran tradukon. En sia letero S-ro Bean atentigis, ke la formo „rubaĵo” estas preferinda ol la formo „rubajto”, kiun li uzis. La Persa vorto *uba'i* signifas epigraman kvarversan strofon; *rubaiyat* estas la pluralo de ĉiu vorto.

EŬROPA LABORATORIO POR ATOMKERNA ESPLORADO KONSTRUOTA EN ĜENEVO (Sv.).

Komence de Oktobro kunvenis en Amsterdam, en la konstruaĵo de la Nederlanda Akademio de Sciencoj, la Eŭropa Konsilantaro por Atomkernaj Esploroj. Reprezentataj estis: Belujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Jugoslavujo, Nederlando, Norvegujo, Svedujo, kaj Svisujo. Unu el la ĉefaj taskoj de la konferenco estis decidi pri la loko de konstruota „Eŭropa” laboratorio por Atomkerna Esplorado. Estis kvar, praktike egalmeritaj proponoj, respektive de Danujo, Francujo, Nederlando kaj Svisujo. En granda harmonio, eĉ sen voĉdono, estis decidate ke ĉi tiu laboratorio estos starigata apud Genevo en Svisujo. La laboratorio estos ekipita i.a. per „proton-sinkrotrono”, produktanta energiojn ĝis 3×10^{10} eV (elektronvoltoj) kaj „sinkro-ciklotrono”, produktanta energiojn ĝis 6×10^8 eV. Por la konstruado de la laboratorio mem (kosto \$ 4×10^6) oni bezonos 7 jarojn, por la unua maŝino (kosto \$ 14×10^6) ankaŭ 7 jarojn, kaj por la dua maŝino (kosto \$ 4×10^6) 4 jarojn. Financos tion la ŝtatoj-membroj, pagante kune, jare, \$ 4×10^6 .

La legantoj komprenu ke ĉi tiu laboratorio estas destinita nur al la esploro de problemoj pure sciencaj. Pri problemoj de „atomkerna energio” en la teknika senco de la vorto, ĝi tute ne okupiĝos. Eventualaj teknikaj konsekvencoj de la tie farotaj esploroj neniel estas antaŭvideblaj. La rezultoj de la esploroj do neniel estos sekretaj, sed estos publikigataj en la koncernaj fakaj gazetoj. — La Redaktoro.

019.941
 (048.1)

RECENZOJ KAJ BIBLIOGRAFIO.

042 : 374.84 : 061.3 = 089.2(52) „1951”

Kongresa Universitato de 38a Japana Kongreso, 1951, eldonaĵo de Nagoja Esperanto-Societo, 39 Kurumada-ĉo 11, Nagoja. 44 paĝoj; formato 128 × 179 mm². Prezo \$ 0.25 + afranko; pogranda prezo \$ 0.20. — Kvar prelegoj de japanaj profesoroj, kun antaŭparolo de prof-o d-ro F. Egami.
 Iĉiro Takasugi: „*Esperanto kaj la Internaciismo*”. Ĉi tiu prelego naskiĝis el spertoj en rusa militkaptiteco (1945).

Yukito Oota: „*Semo Semita*”. Temo: la miljara ĝermipovo de lotusaj semoj; la sensema triploida akvomelono; la diferenco inter la ĝermado (de fabo) kaj la kresko de la ĝermo en mallumo, kaj ĝia disvolviĝo en la lumo.

Riej Hasegawa: „*Nova Ordo en Homa Mondo*”. Pledo por mondfederacio.

Hideo Yagi: „Ĉu ekzistas edukado al la feto?”